**Numero: 307.**
**December 2017.**
**25-a jarkolekto**

# VESPERTO
# Literaturaj folioj





Redaktanto
**Apáti Kovács Béla**
**Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400**
**Telefono: 06/20/497-03-64**
**Retadreso: apatikb111@gmail.com**
**Eldonanto: KAPOŜVARA ESPERANTO-CENTRO**
**Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly**

## *Benitan Kristnaskon por miaj legantoj*

### Atendante la Sanktan Nikolaon

La infanoj malpacience atendis la Sanktan Nikolaon. Dum la atendado la tempo iraĉas malrapide. Ili purigis siajn etajn botojn kaj ili prepariĝis por la granda tago.

Du fratoj Peĉjo kaj Joĉjo revadis pri la ricevotaj donacoj. Ili skribis longan leteron por li, kion ili ŝatus ricevi de la bona maljunulo.

Jam vesperiĝis, la du knabetoj rigardadis tra la fenestro. Sur la strato estis nur kelkaj homoj. Ili rapidis hejmen post la laboro.

Neatendite Peĉjo ekkriis:

— Rigardu, Joĉjo! Tie iras la Sankta Nikolao.

Efektive trans la vojo sur la aliflanka trotuaro iris maljunulo kun granda sako sur la dorso.



— Ankoraŭ ne alvenis la tago de la Sankta Nikolao – diris Joĉjo – nia panjo diris, ankoraŭ ni devas dormi trifoje ĝis lia alveno.

— Eble ĉi jare li alvenos pli frue – diris serioze Peĉjo. – Eble nia panjo scias mise.

— Nia panjo neniam eraras. Ŝi ĉiam scias, kiam li alvenos.

— Ni demandu lin!

— Estas en ordo. Ni demandu lin!

Ili malfermis la fenestron, sed ili ne povis decidi, kiu demandu lin?

— Vi demandu! – proponis Peĉjo. — Vi estas pli aĝa.

— Sed vi ekvidis unue la Sanktan Nikolaon.

— Ni demandu kune!

La ideo plaĉis al ambaŭ knaboj. Post iom da hezitado ili kune demandis:

— Ĉu oĉjo estas la Sankta Nikolao?

La maljunulo unue ne komprenis, kiu alparolis lin.

— Ĉu vi parolas al mi?

— Jes ni alparolis vin – diris Joĉjo. – Ni deziras scii, ĉu vi estas la Sankta Nikolao?

— Ĉu mi la Sankta Nikolao? – ekridetis la maljunulo. – Jes mi estas tio. Ĉu vi estis bonaj infanoj? Sciu, nun mi vagadas en la urbo por ke mi kaŝobservu la knabetojn kaj la knabinetojn, ĉu ili estis bonaj aŭ malbonaj? La bonaj infanoj ricevos de mi multe da donacoj, la malbonaj nur vergon.

— Mi pravis, ke li estas la Sankta Nikolao – diris mallaŭte Peĉjo al Joĉjo. – Kion ni diru nun al li?

— Nu, kiaj infanoj vi estis? – urĝis ilin la maljunulo ĝuante la situacion. – Diru nur la veron, ĉar en mia domo estas mirakloglobo kaj per ĝia helpo mi vidas ĉion.

La knaboj ektimis. Preskaŭ plorante ili rigardis unu al la alia.

La maljunulo iris pli proksime al la fenestro kaj li serioze demandis:

— Nu, knaboj, ĉu vi estis bonaj?

Peĉjo kaj Joĉjo palpebrumante apenaŭ aŭdeble diris:

— Antaŭ nelonge ni estis iomete malbonaj. Ni ne obeis al nia avino. Sed ni promesas, plurfoje ni ne faros tian.

— Ĉu vere? Ĉu vi sincere promesas al mi?

— Jes. En la estonto ni ĉiam estos obeemaj.

— Nun mi pardonas al vi. Verdire ne estis bela afero ne obei al avino, kiu tre amas vin. Mi kredas vin.

— Ni dankas Sankta Nikolao – balbutis la knaboj.

— Mi devas iri, ĉar hodiaŭ mi deziras kontroli ankaŭ aliajn infanojn. Ĝis baldaŭ! Post tri tagoj.

La maljunulo foriris, Peĉjo kaj Joĉjo restis tie sonĝante pri multe da donacoj.

— Onklo Adalberto —



# Kristnaskaj kantoj

Kristnaskaj kantoj

**Tintilar'**
**(Jingle Bells)**

Glitante sur la neĝ',
malantaŭ solĉeval'
Rapide iras ni
sur kampo kaj en val'.
Sur la ĉevala vost'
gajigas tintilar';
Glitrajdo kaj kantado estas
Ĝojo sen kompar'!

(Ho...) Tintilar', tintilar',
tintu sur la voj'.
Rajdi en glitveturil'
ho kia granda ĝoj-o;
Tintilar', tintilar',
tintu sur la voj'
Rajdi en glitveturil'
ho kia granda ĝoj'!

Semajnon antaŭ nun
glitrajdi iris ni,
Fraŭlino Fani Brajt
kaj tutapude mi.
Sed nia ĉevalaĉ',
lin trafis malfeliĉ'...
Li tiris nin sur neĝmontet'
kaj sekvis renversiĝ'!

(Ho...) Tintilar',...

**La unua Noel**
**(The First Noël)**

En Kristnaska vespero
En alta ĉiel'
Al kelkaj paŝtistoj
Parolis anĝel'.

Ili gardis la ŝafojn
Kuŝante sur ter'
En la frosto kaj neĝo
De vintra veter'.

Noel, Noel, Noel, Noel!
Reĝo naskiĝis al Izrael'!

Subite super ili
En fora ĉiel'
Oriente aperis
Belega stel';

Ĝi donis mirindan
Lumon al Ter'
Kaj daŭris tagnokte
En sankta aer'.

Noel, Noel,...





Kristnaska rakonto

Neĝis. Ĉion kovris granda, blanka neĝo. Neniu estis sur la strato. La vilaĝo estis senha kaj trankvila.

Tiun ĉi idilan bildon interrompis viro, kiu malrapide iraĉis.

Kien li iris en la vintra vespero, kiam la homoj entiriĝis sian domon. Nur pala lampolumo signis, ke ene oni ankoraŭ ne dormas.

Estis kristnaskovespere. En la domoj oni jam atendis Jesueton. Ĉefe la infanoj estis tre maltrankvilaj. En ĉiu minuto ili demandadis: „Kiam alvenos Jesueto kun la donacoj?" La gepatroj apenaŭ povis trankviligi ilin.

La viro haltis antaŭ malgranda domo. Li staris senmove en la neĝo.

Li deziris eniri, sed pro io li malkuraĝis. Dume neĝis kaj post kelkaj minutoj li aspektis, kiel neĝulo.

Li atendis. Eble li atendis por ke oni voku lin. Sed neniu rimarkis la esketre starantan viron. La fenestroj estis malheligitaj. Hundo ne signis fremdulon. Kvazaŭ ĝi konus lin, ĉar ĝi plurfoje kuregis al la pordego. Ĝi svingadis eĉ sian voston. Kvazaŭ ĝi estus dirinta:

— Envenu! Mi konas vin. Venu!

Malgraŭ tio la viro ne kuraĝis eniri.

Ankoraŭ printempe pro stulteta afero li forlasis sian familion. Kun la edzino restis trijara knabeto, kiu jam rememoris pri sia patro.



Ofte li demandadis sian panjon: „Kie estas paĉjo?" La virino triste kaj mallonge respondis: „Li foriris."

— Ĉu paĉjo revenos?

— Mi ne scias. Eble iam – respondis la virino kaj serĉis laboron por ke ŝi ne devu respondi al la demandoj de la knabeto.

La viro preĝis. Li preĝis al Dio, ke la domanoj rigardu tra la fenestro kaj ili ekvidu lin.

Fariĝis tre malfarma, eĉ la vento plifortiĝis. Li ege malvarmis. Lia tuta korpo tremis.

Li imagis la varman ĉambron. En la angulo estas kahelforno. Sur la tablo jam tie vaporiĝas la bongusta brasikaĵo kun multe da viandoj. La knabeto certe ludas per io.

Ĉu lia edzino malĝojas pro lia foriro? — Estus bone scii. — Sed la muroj ne estas travideblaj kaj neniu diras: „Envenu!"



Terure!

Se li longe staros tie ĉi, li frostos. Oni trovos antaŭ la domo glaciiĝintan viron.

Almenaŭ la hundo ekbojus. Sed ankaŭ ĝi silentas, eĉ jam ĝi ne venas al la pordego. Ĝi entiriĝis sian hundodomon.

Kion fari en tia frosta kaj neĝa vespero?

Ĉe ĉiu domo jam alvenis Jesueto. Certe jam ankaŭ lia fileto admiras ĝin. Kio estis lia deziro? Kion li deziris por Kristnasko?

Li aĉetis por sia fileto elektran vagonareton kun reloj. La malgrandaj vagonoj kun la lokomotivo kuras ronde, kiel la vera. Ĝi estas tie ĉi en la dorsosako.

Kiel ĝi transdonu al li, se neniu venas eksteren?

En la proksima preĝejo eksonis la sonorilo. Li ektimiĝante ĉirkaŭrigardis. Kvazaŭ la sonorilosono dirintus al li:

— Estu kuraĝa! Ene oni atendas vin.

Li malrapide malfermis la pordon. Kvazaŭ li irus por ŝteli enpaŝis la korton kaj iris al la enirejo de la domo.

Timeme li frapetis sur la pordo.

— Kiu vi estas? – aŭdiĝis virina voĉo el la domo.

— Mi estas Ŝteĉjo. Ĉu mi rajtas eniri?

— Jes, jes – diris la virino kaj tuj malfermiĝis la pordo – Fileto nia, alvenis via paĉjo. Venu rapide!

La viro enpaŝis la varman domon kaj baldaŭe gaja infanrido aŭdiĝis en la malhelan nokton.

Nun jam efektive alvenis Jesueto ankaŭ tien ĉi.

— Ruĉjo —



# Por infanoj



**La fileto de la la malriĉa homo**

— dua ĉapitro —


La reĝo kaŝis sian filineton en la kelon kaj ĉiu tremis de la sepkapa drako.
Ili tre surpriziĝis ekvidante la knabon kaj la reĝo tuj demandis:
— Kie estas la sepkapa drako?
La knabo respondis:
— Ĝi atendas min ekstere, ĉar ĝi fariĝis mia servisto.
Unue oni ne komprenis, kio okazis. Oni pensis, ke tio ĉi estas nur ŝerco kaj baldaŭe ekaperos la sepkapa drako postulante la reĝidinon.
— Diru al la sepkapa drako, mia fileto malaperis. Ŝi ne povis elteni sian malbelecon. Mi ne scias, kie ŝi estas? – diris triste la reĝo.
— Ĉu ŝi malaperis? – ekmiris la knabo. – Mi tuj vokas mian serviston por ke ĝi serĉu ŝin.
— Vane, neniu povas serĉi mian fileton. Estus bone, se ankaŭ la sepkapa drako rezignos, ke la reĝidino malaperis.
— Eble la sepkapa drako rezignos, sed mi ne – diris energie la knabo. – Mi deziras edzinigi vian belegan filinon.
— Ĉu vi? – miris la reĝo. – Ĉu la sepkapa drako donacis ŝian manon al vi? Kie estas nun via ĉefo?
— Mia reĝa Moŝto, en lukto mi superis la sepkapan drakon kaj la drakoj elektis min reĝo.
Tion ĉi ekaŭdante la reĝo tuj ekĝojis. Li ordonis al la servistoj venigi la reĝidinon el la malhela kelo.
Venis ŝi rapide, sed estis iom da problemo. Ŝia vango estis tiom malpura, ke la servistoj apenaŭ povis purigi ŝin.
Pli ol duontagon ili lavis, purigis la reĝidinon. Ili vestis ŝin je ororobo ornamita kun juvelŝtonoj.
Ŝia beleco admiris ĉiun, kiu ekvidis ŝin.
La knabo devis rakonti ĉion, kiel li fariĝis la reĝo de la drakoj.
La homoj ĝojegis, ke ili saviĝis kaj en la estonto ili ne devos timi. La sepkapa drako servos ilin, eĉ la drakoj defendos la landon, se malamiko atakos la fortikaĵon.
Baldaŭe okazis la geedza ceremonio. Ĉiuj homoj de la reĝlando estis invititaj. La knabo venigis sian malriĉan patron, kiu jam ne estis malriĉa, ĉar la knabo konstruigis por li belegan domon, kie li povis vivi ĝis la morto.



Kiam la maljuna reĝo mortis la knabo fariĝis ankaŭ tie ĉi la reĝo. Nun jam li regis en ambaŭ landoj.
La homoj kaj la drakoj tre amis lin, ĉar li estis bona kaj justa reĝo.
Baldaŭe naskiĝis ankaŭ la unua reĝido kaj poste en ĉiu jaro po unu knabo aŭ knabino.
La sepkapa drako atentis pri la infanoj, se ili estis malbonaj, tiam ĝi timigis ili, se la geknaboj estos malobeemaj, tiam ĝi portos ilin al la fora drakolando.
Jen la fin', eta porkido portu ĝin!

— Onklo Adalberto —

— Fino —



# Kristnaskaj bildoj

Kristnaskaj bildoj













**Prosperan novan jaron por 2018**